

Germana Esperantisto

kun

Esperanto-Praktiko

Oficiala organo de Germana Esperanto-Asocio — (G. E. A.) — kaj de aliaj Esperantistaj Unuiĝoj
Amtliches Blatt des Deutschen Esperanto-Bundes E. V. und anderer Esperantisten-Vereinigungen

Elvenas en la komenco de ĉiu monato

Abonprezoj kaj prezoj por anoncoj estas ŝanĝeblaj; ili estas speciale publikigataj sur la unua kovrilpaĝo de ĉiu numero



Erscheint zu Anfang eines jeden Monats

Bezugs- und Anzeigenpreise sind veränderlich; sie werden auf der ersten Umschlagseite jeder Nummer bekanntgegeben

Fondinto: J. Borel — Ĉefredaktoro: Friedrich Ellersiek — Respond. redaktoro: Arnold Behrendt
Alsenditajn artikolojn ni korektas laŭ bezono. Nepresitajn manuskriptojn ni resendas nur, se oni aldonis afrankajon por tio

21a Jaro N-o 10 (344)

Eldonejo kaj redakcejo: Berlin SW61, Wilmsstr. 5

Oktobro 1924

Raporto

pri la

XVIA Universala Kongreso de Esperanto en Wien*)

(6.—14. AŬGUSTO 1924)

Kiam mi en Wien atendis la malfermon de la solena manifestacio por Esperanto kaj ĝojis pri la bonaj sidlokoj, kiujn mia edzino kaj mi trovis en la dua vico de la granda salonego, s-ro *Ellersiek* alpaŝis min kaj petis, ke mi faru la raporton pri la oficialaj aranĝaĵoj de la kongreso por lia G. E. Mi ja ne volis plenumi lian peton, konsciante ke multe da alia laboro atendus min hejme, sed mia edzino decidis la aferon per la vortoj: „Li faros la raporton.“ Do, mi obeis — en malgravaĵoj mi obeas, en gravaĵoj ŝi devas obei. Per tio mi tute ne volas diri, ke raporto pri kongreso estas malgravaĵo, ĉar precipe la nepartoprenintoj atendas ĝin kun malpacienca, kaj eĉ la partoprenintoj ĝojas, denove spirite travivi ĉiujn okazintaĵojn. Mi klopodos esti kiel eble plej objektiva, sed tamen estu permesate al mi, enŝovi tie kaj tie kelkajn personajn rimarkigojn. Mi procedos laŭ kronologia ordo.

Merkredon, la 6an de Aŭgusto. — Hodiaŭ la plejmulto de la kongresanoj alvenis fervoje aŭ ŝipe kaj unue iris al la kongresejo, kiu estis la bela koncertodomo. Neniam eble Esperanto-kongreso havis pli belan kaj pli indan ejon. Sufiĉe da ĉambregoj kaj ĉambroj, larĝaj ŝtuparoj kaj koridoroj kaj vasta vestiblo, kie troviĝis vendejoj ktp., agrablis la restadon. Komfortaj babilejoj, fumejo kaj eĉ ripozejo estis je ĉies dispo. Precipe pri la ripozejo en la 3a etaĝo la raportanto tre ĝojis, ĉar estis li, kiu Paskon en Genève instigis s-ron *Schade*, la ĉefsekretario de la kongreso, instalitan por tiuj, kiuj loĝas tro malproksime kaj post la tagmanĝo volas pasigi unu aŭ du horojn trankvile dormetante sur mola kanapo. En la sekretariejo, kiu troviĝis en la unua etaĝo, amasiĝis je mia alveno je la 7a centoj da samideanoj, kiuj postulis siajn kongresdokumentojn kaj la loĝejan bileton. La disdonado de la dokumentoj ktp. estis ne tiel praktika kiel en Nürnberg, kie ekzistis

apartaj disdonejoj por po mil kongresanoj. Post longa atendado oni fine ricevis tion, kion oni deziris — aŭ devis aŭdi la sciigon, ke la nombro de kongreslibroj ne sufiĉas, ke la presejo estas presonta novajn dum la nokto, kaj ke oni revenu morgaŭ matene. Interkonatiĝa vespero bedaŭrinde ne okazis; eble la L. K. K. pensis, ke ĉiuj estis tro lacaj post la vojaĝo. Tamen mi konsilas, ke oni dum venonta kongreso ne denove rompu la bonan tradicion.

Ĵaŭdon, la 7an de Aŭgusto. — Je la 10a matene „interna malfermo de la kongresa laboro“. Ĉi tion oni legis en la programo. La meza salonego, kie ĝi devis okazi, baldaŭ estis plenplena. Oni atendis 10 minutojn, 15 minutojn, sen tio ke iu el la L. K. K. malfermis la kunsidon. Fine, kiam oni jam malpacienca, Dro *Privat* leviĝis kaj proponis, por ne perdi pli da tempo, rigardi la kunvenon kiel ĝeneralan kunsidon de U. E. A. Post saluto al la ĉeestantaj *vidvino kaj filino Lidia de nia majstro*, Dro *Privat* komentis la U. E. A.-raporton en la kongreslibro. La nombro de 6000 membroj ne sufiĉas, oni nepre bezonas 10000. Post ekŝigo de s-ro *Stettler* kiel prezidanto (nun honora prezidanto), Dro *Privat* prenis sur sin la respondan gvidadon de U. E. A., helpata de la longjara meritplena, senlaca ĝeneralsekretario *Hans Jacob*, kiun U. E. A. honoris per la titolo „direktoro“. Tre grandan intereson vekis la komuniko de Dro *Privat*, ke la Esperantistaro baldaŭ posedos propran radiostacion en Genève. Iu mecen jam donis la duonon de la necesa sumo (ĉu prunte aŭ donace, mi ne povis eksci); tasko de la tutmondaj samideanoj estu, havigi la alian duonon. La prezidanto invitas la ĉeestantojn, grandnombre viziti la morgaŭajn radio-prezentaĵojn en la sama salonego. Post vigla diskutado Dro *Privat* fermis la kunsidon je la 12^{1/2} h.

Vendredon, la 8an de Aŭgusto. — Hodiaŭ okazis unu fakkunsido post la alia aŭ du kaj pli samtempe, entute pli ol dudek. La sekretarioj de

*) Escepte la fakkunsidojn kaj la plezurojn.

tiuj ĉi fakkunsidoj publikigis aŭ publikigos apartajn raportojn en la fakgazetoj aŭ alialoke. — Aparte menciinda estas la publika solena ĉefkunveno por *komercistoj* en la festsalono de la Komerca Gildo. Dro *Steche* faris bonegan propagandan paroladon, al kiu oni estus dezirinta pli multe da ne-esperantistaj aŭskultantoj, ol efektive ĉeestis. Ĉu la komercistaro de Wien efektive estas indiferenta al Esperanto? Tio estus vere bedaŭrinda pro la komercistoj mem! — Je la 8a vespere komenciĝis la de Dro Privat anoncigitaj radio-prezentaĵoj en la meza salonego. Vere ĝuplena vespero. Wien-a radiostacio tre dankinde estis disponiginta sian sendilon al la kongreso, kaj alia radio-firmao estis pruntedoninta la ricevilon kun du grandaj laŭtparoliloj. Reprezentantoj de diversaj nacioj aŭdigis sian voĉon, unue dirante kelkajn vortojn en sia gepatra lingvo, poste en Esperanto. La aŭskultantaro estis tute surprizata de la bonega komprenebleco de la parolantoj. Sed montriĝis klare, ke plej facile oni povis kompreni la Esperantajn vortojn. Baldaŭ poste la parolintoj revenis de la send-stacio kaj montris sin sur la estrado, vigle aplaŭdataj de la entuziasmiĝinta ĉeestantaro. La ordinara programo de la Wien-a radio-stacio, prezentaĵoj de orkestro kaj de gekantistoj, plenigis la reston de la interesegega vespero.

Sabaton, la 9an de Aŭgusto. — Dum la antaŭtagmezo okazis fakkunvenoj kaj kunsidoj de la oficialaj institucioj de Esperanto. Posttagmeze je la 3a granda parto de la kongresanoj ĉeestis la inaŭguracion de Zamenhof-a memortabulo ĉe hotelo Hammerand en la Florianigasse. Redaktoro *Schröder*, prezidanto de la L. K. K., salutis sinjorinon kaj fraŭlinon Zamenhof kaj ĉiujn ĉeestantajn gesamideanojn kaj poste donis la parolon al Dro Privat por la inaŭguracia parolado. En sia konata elokventa maniero Dro Privat plenumis sian taskon, menciante precipe la senlancan kaj homaman laboron de nia majstro kiel okulkuracisto. Por perfektigi en la oftalmologio (okulkuraca scienco), Zamenhof restadis dufoje en Wien. Kiom da beno refluis al la okulmalsanaj malriĉuloj en Varsovio! Poste parolis ankoraŭ profesoro *Bujwid*, samlandano de Zamenhof. La germanlingva teksto de la grizmarmora memortabulo tradukite estas: „Dro Lazaro Ludoviko Zamenhof, 1859—1917, al kiu la homaro dankŝuldas la helpan lingvon Esperanto, loĝis en la jaroj 1886 kaj 1897 en tiu ĉi domo“. Fine s-ro Schade, kiel ĉefsekretario de la kongreso, fortiris la du Esperanto-flagojn, kiuj kovris la tabulon. La himno finis la modestan, sed tamen tre impresan ceremonion. — Je la 4a okazis komuna fotografado sur la ŝtuparo de la urbdomo, kaj je la 7a komenciĝis la „interkonatiĝa antaŭfesta vespero de la kongresano“, kiel diris la programo. Pri ambaŭ aranĝaĵoj la leganto legos detalojn en la raporto pri la kongresaj plezuroj.

Dimanĉon, la 10an de Aŭgusto. — La katolikaj Esperantistoj grandnombre ĉeestis je la 8^{1/2} h. solenan diservon en la belega Karl-preĝejo. La meson festis la franciskana pastro *Carolfi* el Italujo kaj la predikon parolis pastro *Plank* el Wien.

Je la 11a (do kun unuhora malfruiĝo!) komenciĝis en la luksa ĉefsalonego de la kongresejo la granda solena manifestacio de la kongreso. Tiu ĉi

manifestacio anstataŭis la kutiman solenan malfermon de la antaŭaj kongresoj. Laŭ la L. K. K. gravaj kialoj estis kaŭzintaj la ŝanĝon. Tamen mi esperas, ke venonta kongreso ne imitos la Wien-an ekzemplon. Post orgena preludo kaj du kantoj de miksitaj ĥoro laŭtradicie la prezidinto de la lastjara kongreso, profesoro *Dietterle*, malfermis la manifestacion kaj proponis kiel prezidanton de la XVIa ministerian konsiliston Dron *Minibek* el Wien. La propono unuanime estis akceptata. La tuta ceremonio, kiu nun sekvis, nepre similis al la kutima malfermo de la ĝisnunaj kongresoj. La prezidanto salutis s-inon kaj f-inon Zamenhof, la honorgastojn kaj ĉiujn gesamideanojn. Poste salutis la kongreson kaj deziris bonan sukceson la reprezentantoj de la aŭstra respubliko, de la urbo Wien kaj de la fremdlandaj registaroj aŭ ministerioj. Ili faris tion parte germanlingve, parte esperantlingve. Fine parolis dum po unu minuto la reprezentantoj de la naciaj Esperanto-organizacioj. Laŭ instigo de la prezidanto ili diris unu aŭ du frazojn en sia gepatra lingvo kaj ĉion alian en Esperanto. Tio tre interesis la ĉeestantaron, precipe tiujn, kiuj la unuan fojon partoprenis kongreson. La komuna kantado de la himno — bedaŭrinde tro altvoĉe ekkantita — finis la bonsukcesintan manifestacion. Sed tamen mi ne povas reteni kelkajn vortojn de bonintenca kritiko. La preparoj sur la estrado nur komenciĝis, kiam la samideanoj jam estis enirintaj la salonegon. Tio malutilis al la iluzio. Oni enlasu la partoprenantojn nur, kiam ĉio estas preta. Rilate al la ornamo de la salonego la L. K. K. estis tro ŝparema. Neniu verda arbo, neniu floro. La tablo de la estraro aspektis kiel bilardo kovrita per eluzita verda tuko. La busto de nia majstro estis apenaŭ videbla; ankaŭ ĝi estis tute sen ornamaĵo. Praha kaj Nürnberg estus povintaj servi kiel modelo por Wien!

Lundon, la 11an de Aŭgusto. — Sub la prezidanteco de Dro Privat la 2a ĉefkunsido de la XVIa komenciĝis je la 10a en la meza salonego. Post voĉlegado de diversaj salutleteroj kaj telegramoj la prezidanto tre klare priskribas la „kontrakton de Helsinki“, la nunan organizon de la Esperanto-movado, kaj promesas, ke la Centra Komitato baldaŭ eldonos oficialan libreton pri tiu ĉi temo. Longan diskutadon, ne ĉiam agrablan, estigis la demando pri ĝenerala kaj teknika vortaroj. Laŭ mia opinio granda kunveno ne estas ĝusta loko por tiel scienca afero. La plej bonan diris profesoro Dro *Dietterle*, rekomendante la subtenon de la enciklopedia vortaro de *Wüster*, ĉar kvankam ĝi estas verkita Esperanto-germana, ĝi tamen povas servi al vortaristoj de ĉiuj nacioj. Poste oni preparolis la raporton de la K. K. K., kiu ne aperis en la kongresa libro, sed nur post alveno de ĝia prezidanto, s-ro *Warden*, en la Kongresa Bulteno. Dro Privat konstatis kaj s-ro *Warden* jesis, ke la raporto sole estas sendita al Wien, ne al Genève. La L. K. K. asertis, ke ĝi ne alvenis, do kulpa estas — la aŭstra poŝto! La ĝenerala opinio, kiu rezultis el la diskutado, estas, ke la K. K. K. pro la kontrakto de Helsinki nun ne plu estas necesa. La decidon oni prokrastis ĝis morgaŭ. Reprezentanto de la junularo faris la proponon, pli ol ĝis nun faciligi al la junaj Esperantistoj (studentoj, gimnazi-

anoj ktp.) la partoprenon en universalaj kongresoj. Dro *Trögel* el Auerbach vigle apogis la proponon, kiu estis transdonata kiel deziresprimo al la L. K. K. de la sekvonta kongreso. La propono donis okazon, priparoli la promeson de la Wien-a L. K. K. pri rabato ĉe la aŭstraj fervojoj, promeso, kiun oni ne plenumis. S-ro Schade senkulpigis la L. K. K.-on kaj montris la formalajojn, kiuj estas necesaj por ricevi rabaton almenaŭ por la hejmveturo. Versajne multaj rezignis pri la formalajoj kaj la rabato. Poste s-ro *Edmonds* tre interese komentis sian raporton pri K. R. (Konstanta Rezentantaro de la naciaj societoj). Estis vera ĝuo, aŭskulti tiun laboreman, celkonscian, humorplenan britan samideanon. Fine estis voĉlegata kaj akceptata la nova kongresa regularo, prezentita de la Centra Komitato sur la bazo de la fundamentaj dokumentoj. Je la 12^{1/2} h. la prezidanto fermis la kunsidon.

Mardon, la 12an de Aŭgusto. — En la tria ĉefkunveno de la XVIa, kiu komenciĝis je la 10a, Dro Privat unue donis kelkajn klarigojn pri la raporto de C. K. (Centra Komitato), kiu ne tute korekte estas presita en la kongreslibro. La unuan fojon C. K. montras bilancon. La prezidanto plie parolis pri la teknika konferenco, kiu Paskon 1924 okazis en Genève, kaj sciigis, ke la sekvonta konferenco kunsidos en Paris, ĉar de post la malapero de la malnova registaro la ŝancoj estas nun multe pli bonaj en Francujo ol antaŭe. S-ro *Hromada* kiel gazetara fakestro de C. K., bedaŭris, ke li ne sukcesis kunvenigi ĝis nun la gvidantojn de la naciaj gazetservoj. S-ro *Poncet* el Lyon petis, ke la internaciaj institutoj de Esperanto sin turnu al la registaroj aŭ oficialaj estraroj de iu lando nur post interkonsento kun la nacia societo de la koncerna lando. Poste la prokrastita demando pri konservado aŭ forigo de K. K. K. estigis denove longan diskutadon. Ĉiuj parolantoj konstatis kun granda dankemo la bonegajn servojn de K. K. K. kaj precipe de s-ro Warden, sed opiniis, ke C. K. povas de nun preni sur sin la laborojn de la ĝisnuna K. K. K. Ju pli simpla la tuta organizo de la Esperantistaro, des pli bone por la movado. La rezulto de la diskutado do ne povis esti alia ol forigo de K. K. K. Fino de la kunsido je la 12^{1/4} h.

Merkredon, la 13an de Aŭgusto. — Hodiaŭ okazis la lasta ĉefkunsido kaj la interna fermo de la XVIa. Je la 10a Dro Privat ĝin malfermis. S-ro *Applebaum*, honora sekretario de la organiza komitato por starigi Zamenhof-monumenton, donis kelkajn klarigojn pri sia raporto en la kongresa libro. Post sciigo de s-ino Zamenhof Dro Privat deklaris, ke la inaŭguro de la monumento sur la tombejo estos ebla nur en somero 1925 aŭ 1926. La kunveno decidis, ke C. K. en interkonsento kun la organiza komitato fiksas la daton. Sekvis nun tre, eĉ tro longa diskutado pri propono de Pola Esperanto-Asocio. Konstatante „ke multaj Esperantistoj ne sufiĉe konformiĝas al la lingvaj opinioj de la oficialaj lingvaj institutoj“, la propono postulas, „ke la XVIa turnu sin al ĉiuj Esperantaj organizoj kaj gazetoj kaj al ĉiuj individuaj Esperantistoj kun peto kaj postulo, ke ili konformiĝu al ĉiuj lingvaj opinioj de la Akademio kaj de la Lingva Komitato“. Kompreneble tiu ĉi propono kaŭzis

viglan, preskaŭ pasian debaton pri lingvaj demandoj, ekzemple pri la landnomoj, kaj la prezidanto pli ol unu fojon havis okazon, montri sian diplomatan lertecon, por glatigi la ondojn. Tamen la propono fine estis akceptata post tri ŝanĝoj deziritaj de s-ro Edmonds. Sekvis mallonga priparolado de propono de la Esperanto-Societo por Stirio, petskribi al la Nobel-fondaĵo, ke ĝi bonvolu doni premion al la familio de la majstro. Spertuloj tuj diris, ke tio ne estos ebla, ĉar la Nobel-premiojn povas ricevi nur vivantaj personoj aŭ institutoj. Oni petis la C. K., pripensi la aferon. — S-ro *Horner* informis pri la disvastiĝo de Esperanto en la rondoj de la Kristana Asocio de Junaj Viroj kaj atentigis pri la universalaj kongresoj de tiu ĉi asocio, kiu okazos 1925 en Helsinko. — Oni konstatis, ke la universalaj Esperanto-kongresoj estas tute neŭtralaj. Ilin povas partopreni Esperantistoj el ĉiuj sociaj klasoj. — S-ro *Merchant* invitis la kongreson por 1926 al Anglujo. Goje la invito estis aplaudata. Por 1925 neniur urbo invitis. Estas la unua fojo, ke oni ne scias, kien iri la venontan jaron. La prezidanto diris, ke anstataŭ kongreso oni ja povus aranĝi someran universitatan semajnon en bela loko de Svisujo, kaj petis, ke oni lasu la decidon al C. K. Nun la tagordo estis elĉerpita. La prezidanto Dro Privat dankis al la L. K. K., kiu faris sian eblan por sukcesigi kongreson de 3000 personoj, afero tute ne facila. Post kelkaj dankaj vortoj de s-ro Schade en la nomo de L. K. K. la prezidanto fermis la kongreson.

Mi finis mian taskon, raporti pri la XVIa, escepte la fakkunsidojn kaj la plezurojn. Entute mi devas diri, ke la kongreso plaĉis al mi. La propaganda efiko eksteren certe estis tre granda. La gazetaro kaj la publiko de Wien multe pli interesiĝis pri nia afero ol la gazetaro kaj la publiko en Nürnberg. Ni do povas esperi, ke la samideanoj en Wien, kiuj meritas koran dankon, dum la venonta vintro kolektos la fruktojn de sia meritplena grandega laboro. Studkonsilisto *W. Knopf*

Kongresveturo Berlin—Wien

Komencinte en Aprilo la laboron por la aranĝoj de la komuna kongresveturo mi antaŭsentis, ke la tasko en la nuna jaro estos multe pli malfacila ol en la antaŭa jaro pro la pasporta kaj vojaĝa aferoj, kvankam la nombro de la partoprenintoj ne atingis tiun de la lasta ara veturo al Nürnberg. Ĝis la 15a de Julio anoncis sin 20 gesamideanoj kaj ĝis la 27a de Julio, la lasta tago de la aliĝo, la nombro triobligis tiel, ke min preskaŭ sufokis la laboro. Estas strange, ke multaj atendas ĝis la lasta momento kaj per tio ege plimalfaciligas la taskon, eĉ endanĝerigas la tutan planon.

La antaŭlaboro suferis pro la neklara opinio pri la rabato por la vizkostoj kaj veturprezoj. La Ĉenosl. Asocio Esp. publikigis, ke ĉiu kongresano ricevos ĉehan vizon rabatitan je 50%. Ĉar tiu vizo por la al- kaj reveturo kostas ordinare 60 kĉ, la rabatita prezo estus 30 kĉ. Sed neĝuste: ĝi estis 40 kĉ, prezo de simpla vizo por unufoja traveturo, valida por ni samtempe por la retraveturo. Kelkaj ĉehosl. konsulejoj en aliaj germanaj urboj kaŭzis

ĉagrenon al la gesamideanoj kaj rifuzis la rabaton, ekz. en Dresden kaj Hamburg. Leteroj de mia amiko Hromada, ĝenerala sekretario de la Ĉeosl. Asocio Esp., al tiuj konsulejoj fine forigis la obstinan malbonvolon. Al li estu esprimata sincera danko! — La aŭstra konsulejo en Berlin postulis, ke por ĉiu pasporto estu aldonita demandara folieto, kiu kostis aparte 2 Gm. Ĉar mi ricevis 45 pasportojn pro prizorgo de vizoj, mi estis kondamnita, pleniĝi 45 folietojn kun pli ol 12 demandoj. Alia malagrablo neantaŭvidita ekestis per tio, ke la ĉeosl. konsulejo postulis pagon nur per ĉeĥa mono kaj, por aĉeti tiun, mi devis havigi al mi la permeson de la financoficejo.

La ĝojo pri la alproksimiĝanta XVIa, ĝiaj ĝuoj kaj la atendataj travivaĵoj ĉiam denove donis al mi freŝan forton.

Baldaŭ ĉio necesa estis plenumita. La Berlin-a fervoj-direkcio afable rezervis al ni po unu speciala vagono de el Berlin kaj Dresden. Fine estis veninta la vespero de la 4a de Aŭgusto, kiu kunigis la gepartoprenantojn en kafejo Josty, por tie interkonatiĝi, babili, ricevi la pasportojn, vojaĝkajeretojn kaj la lastajn informojn. Okazis ankaŭ grupa fotografado bone sukcesinta.*) Laŭ mia instigo konata banko instalas ankaŭ tie monŝanĝejon.

Sekvintan matenon je la 7^{1/2}a oni vidis sur la perono de *Anhalter* stacidomo multajn gajajn verd-stelanojn formantaj internacian rondon. 64 el ili estis gepartoprenantoj, la aliaj nur akompanintoj, kiuj bedaŭris la postreston. La speciala vagono estis plenokupita. 10 minutojn antaŭ la ekveturo okazis denove fotografado de la anaro.*)

Precize je la 8a la trajno ekmoviĝis, forlasante la stacidomon kaj postlasante malgajulojn.

Nun forflugis la tempo sufiĉe rapide, oni babilis, rakontis, ridegis, faris petolaĵojn ktp. Mi ne povis ripozi, ĉar aliaj taskoj atendis min: egaligo de la kontoj, kolekto de mono por la veturo tra Ĉeĥoslovakio. Tiurilate afable helpis min nia kara *Eko*, kiun mi dankas pro tio ankaŭ ĉi tie.

En Dresden ni alvenis je la 11²². Tie atendis nin en la ĉefstacidomo 60 aliaj gekongresanoj gajmiene. Ili jam estis okupintaj la duan por ili pretigitan vagonon. S-roj *Karsch* kaj *Engst* prizorgis la antaŭlaborojn. La kvaronhoran restadon oni plenigis per valora interkonsiliĝo, transdono de salutoj al aliaj gekongresanoj kaj pluveturis kun flirtantaj flagetoj. S-ro *Feder* el Chemnitz estris la Dresden-an parton de la karavano.

Alveninte en Tetschen, la germana-ĉeĥa limstacio, je la 1a p. m., la Berlin-a parto devis ŝanĝi la vagonon kaj okupi alian vagonon jam pretigitan. S-ro *Klinger*, del. de U. E. A., atendis nin en la stacidomo kun siaj gegrupanoj kaj fervore subtenis min en la prizorgo de veturbiletoj, ŝanĝo de mono ktp. Dank' al li, la doganoficejo ne esploris niajn pakajojn. Koregan dankon ankaŭ al li pro lia helpo!

Ĉio ĝis nun bone funkciis kaj sukcesis. Post unuhora restado nia trajno forlasis Tetschen kaj daŭrigis la veturon sur ĉeĥoslovaka lando.

Je la 4a p. m. ni atingis Praha-n kaj elvagoniĝis en la Wilson-stacio. Tie akceptis nin amikoj

Hromada kaj *Glück*, nia altŝatata prezidanto, kun multaj aliaj gesamideanoj. Koraj bonven- kaj salutvortoj flugis ĉi tien kaj reen. La stacidoman halon plenigis laŭtaj ĝojokrioj. S-ro Hromada kondukis nin al la atendejo unuaklasa kaj tie, laŭ lia propono, la karavano partiĝis laŭ la Berlin-a kaj Dresden-a parto. Por la Berlin-a parto mi ricevis la loĝejajn kartojn kaj disdonis ilin laŭ maniero saĝe aranĝita de s-ro Hromada. Nun ni forlasis la atendejon kaj eniris 3 tramvagonojn, kiuj, disponigite speciale por ni, atendis nin antaŭ la stacidomo. Per ili ni veturis al la unuaranga hotelo Beranek, por tie en puraj ĉambroj ripozigi iomete la lacan korpon, nur iomete, ĉar post unu horo la 3 tramvagonoj denove akceptis nin por trihora rondveturo tra la urbo Praha kun ĝiaj allogaj, belegaj konstruaĵoj, ĝardenoj, montetoj, pontoj, kasteloj ktp. Bedaŭrinde ne estas spaco ĉi tie, por priskribi detale ĉion, kion ni vidis, rigardis kaj admiris. Mi nur mencias la Hradŝinon, ponton de Karolo kaj la universitaton. La antikva beleco mutigis nin. Tro rapide forflugis la tempo, kaj ĉiu, kiu partoprenis la XIIIan (1921), refreŝigis malnovajn memorojn.

Vespere ni kunvenis en la restoracio de la hotelo Beranek, por satigi la ribelantan stomakon. Kaj vere, la manĝaĵoj estis tiom diversspecaj, bongustaj, ampleksaj kaj malmultekostaj, ke oni ĉagreniĝis pri jama satiĝo. Tre volonte mi estus gustuminta aŭ manĝinta ĉiujn delikataĵojn laŭvice! Sed la stomako malkapabliĝis bedaŭrinde. Post la manĝado okazis kelkaj paroladetoj, inter ili de s-ro *Pitlik*, *Hromada*, *Glück* k. a. Mi dankis en la nomo de la karavananoj al s-ro Hromada kaj al la ĉeĥaj geamikoj por ilia sukcesplena kaj modele aranĝita akcepto. Ni ne forgesos la gajajn horojn en Praha! — —

La okuloj kaj la stomako estis satigitaj, sed ne jam la koro. Pro tio kelkaj „diboĉuloj“ noktmeze vizitis Praha-n, por serĉi — — mi ne scias, kion. Inter ili estis ankaŭ Berlin-anoj, sed mi ne mencias la nomojn, ĉar mi estas silentema. Estis post la 2a nokte, kiam ni enlitiĝis. Ĉu oni povis dormi? Certe ne. — Post trihora duondormo oni frapis la pordon je la 5a matene kaj ordonis ellitiĝon! Ho, kiom lacega! La kruroj strikis, sed nenio helpis. La tempo ne haltas, do rapide, ĉar niaj specialaj tramvagonoj volas akcepti nin je la 6a, por veturi kun ni al la stacidomo.

Kiam mi malsupreniris en la restoracion, jam sidis tie miaj kunvojaĝantoj, trinkante la bonegan kafon.

Post kiam ni ĉiuj estis matenmanĝintaj, ni entramiĝis. Alveninte antaŭ la stacidomo, mi transdonis al la afablaj tramkonduktoroj la kolektitan monsumon kaj adiaŭis.

La 6an de Aŭgusto, je la 7a matene, nia karavano, pligrandigita de multaj ĉeĥaj geamikoj, forlasis la belan Praha-n per nia trajno. Dum la sekvanta sephora veturado ĉiu amuziĝis laŭ sia petola volo, oni eĉ kantis ĥore, ĝis kiam ni atingis Wien-on je la 2a p. m. Kaj nun — — mi travivis la plej grandan seniluziĝon de mia 12jara Esperantista vivo!

*) La bildo kostas 1,50 Gm. kaj estas havebla ĉe „Welt-Photo-Bericht“, Berlin-Neukölln, Donaustraße 6.

Pacifista Manifestacio en Wien

La pacifista manifestacio okazis lundon posttagmeze en la grandega salono de la kongresejo, kiu estis tute plena kaj do enhavis pli ol 3000 partoprenantojn, — Esperantistoj kaj Vien-anoj, ĉar la invito estis ĝenerala kaj la paroloj germanlingvaj kaj Esperantaj estas tradukataj en la alian lingvon tre klare kaj laŭte de s-ro *Smital*, vic-prezidanto de la Universala Esperantista Pacifista Ligo. Krom la solena malferma kunsido tiu ĉi kunveno estis la plej impona kaj inda en la kongres-semajno.

La du partoj de la programo komenciĝis per majstra orgenludo. S-ro *R. M. Frey*, la ne-lacigebla ĉef-sekretario de la Ligo, kiu ankaŭ aranĝis ĝiajn tri laborkunsidojn, salutis la kunvenintaron kaj aparte s-rinon *Zamenhof*; li memorigis la antaŭan Ligo-prezidanton, mortintan prelaton *Gießwein* kaj dankis al la estraroj reprezentataj. Oni laŭtlegis diversajn salutojn, ekzemple de l' prezidanto de la Respubliko; li tre ĝojas, ke ankaŭ la Esperantistoj laboras por interkonsento inter la popoloj. Inter la telegramoj estas citinda tiu de prof. *Otto Simon* el Vieno, kiu pro sia ne-sano estis for de la urbo: „Militon al la milito kaj hipokrito, triumfon al la *Zamenhof*-a spirito.“ S-ro *Degen* el Leipzig en nomo de la Ligo de Instruistoj certigis, ke la Esperantistaj instruistoj estas, jam laŭ sia regularo, decide pacifistaj, ili plenumos sian devon kun koro fervora kaj kun amo ĉiam persista. Universitata profesoro *Dro Süß*, la protektanto de la pacifistaj kunsidoj, diris la enkondukan paroladon: ... politika laboro ne garantias pacon, se tiu ĉi ne penetras en la korojn ... ekzistas nur unu justeco ... celu al ĝi, tiam vi donos al la artaĵo de *Zamenhof* vivantan animon. La ĥino *Kenn* diris, ke en sia lando ne ekzistas devigo al milita servo, eĉ oni diras proverbon: „Bona filo neniam fariĝas soldato.“ La ĥina vorto por paco „ho-ping“ enhavas la ideojn: harmonio-egaleco, trankvileco. Do egaleco, ne supereco.

Post la paŭzo aktoro *Reger* deklamis bonege la faman *Zamenhof*-an kongres-preĝon de Bulonjo: „Al vi, ho potenca senkorpa mistero, ...“. Jam de komence staris sur la estrado du fraŭlinoj en belaj naciaj kostumoj kun granda verda rubando, en la du supraj anguloj estis Esperanto-steloj en blankaj kvadratoj, kaj sur la rubando oni legis la blankliteran surskribon „Universala Esperantista Pacifista Ligo“. Ĉe la vortoj „la verdan standardon tre alte ni tenos, ĝi signas la bonon kaj belon“ la standard-inoj alpaŝis kaj alten tenis la signon post super la deklamanto. — Poste s-rino *Isbrücker* el Hago, la nova prezidantino de la Ligo, alparolis: ... mi ĉiam miras, ke oni devas batali por paco ... ĉu ne estas honto, ke la scienco unuflanke serĉas forigi doloron, malsanon, mizeron, kaj aliflanke preparas la ilojn, kiuj kaŭzas la malbonojn milope ... ĉu ne estas honto, ke mortigo unuopa estas severe punata de registaro, kiu samtempe instigas al amasa buĉado, kaj tion oni nomas heroaĵo! ... nia spirito estu sana kaj forta, kaj la baĉilo de milito neniel influu ĝin. Poste ŝi parolis pri la celado de *Spiller* el Genevo (ĉef-aginto en la internacia kongreso pri morala eduko, 1908, kaj la unua kongreso de raso); ŝi diris, ke la Ligo akceptis lian programon,

laŭ kiu oni laboru dum sep jaroj intense por la pacifista ideo.

Dro Privat el Genevo diris poste la ĉef-paroladon en sia en Esperantujo fame konata oratoreco. Li deklaris antaŭe singarde, ke lia parolo estas duoble „privata“, li en nuna momento sin sentas ordinara civitano. Li aludis la du infanojn (8 kaj 10-jaraj) ĉe la kongreso, kiuj bone parolis Esperanton „sen eraro pri akuzativo“; vidante tiajn etulojn teruro nin kaptas, se ni imagas la antikvan monstron, dio Baal, en kies ruĝan buŝon oni oferante ĵetis infanojn. Tia monstro ekzistas ankoraŭ — ... vi patrinaj eble vidos ĵetataj viajn infanojn en la buŝon malpuregan ... nun pacifista movado devas esti militema ... se vi lasas vivi la monstron, ĝi manĝos viajn infanojn kaj vin mem, la besto fariĝis pli inteligenta, ĝi ne nur havas siajn ĵurnalistojn kaj diplomatojn, sed ankaŭ dungis scienculojn ... La proksima milito ne nur estos terura, sed ridinda ... vi mem nutris la beston per la impostoj pagitaj ... ridindigu la militon! En Genevo oni starigis la Popol-Ligon, sed tie sidas ŝtatistoj, samaj, kiaj antaŭe gvidis la popolojn kaj kondukis en mizeron, la popoloj kune agu ... ni ne pagas al tiuj, ke ili aranĝu militon. ... Ĉiuj klasoj havu kunvenojn, por efektiviĝi la programon de *Spiller* ... En London, kiam oni funebris je honoro de la „nekonata soldato“, dum kelkaj minutoj haltis ĉiu laboro, ĉiu trafiko en la urbego, ĉiu demetis sian ĉapelon, ankaŭ la reĝo, kaj jen — mizerulo kun unu kruro! li demandis: „ĉu tio estas komedio aŭ sinceraĵo?“ ... eksonis kvazaŭ voĉoj de la buĉitoj el la tero: „ni plenumis nian devon, nun vi faru la vian!“

Finis la impresan manifestacion la komune kantata Esperanto-himno, per orgena akompanata. „Ni laboru kaj esperu!“ „ĝis la bela sonĝo de l' homaro por eterna ben' efektiviĝos“.

P. Christaller

Resonado

(Ĥo de Eko)

Nun fine la fino de miaj travivaĵoj en Italujo, kiujn mi komencis rakonti en la antaŭa numero.

Mi do estis en Recco ĉe s-ro *Jean Borel*. Lia loĝas tie dum la vintro kaj printempo pro sia sanstato, al kiu malutilas la tiutempe malmilda klimato de lia hejmlando Svisujo. Lia hejmo en Recco estas luita dometo staranta super la strato sur la deklivo de monteto, tre proksime al la marbordo. La dometo estas ĉirkaŭata de malgranda ĝardeno, riĉa de rozoj kaj sudlandaj arboj kaj aliaj kreskaĵoj. De sur la teraso de la ĝardeno oni ĝuas belan panoramon de parto de la vilaĝo kaj de la vasta maro lazura. Tie mi sidis la unuan antaŭtagmezon de mia restado, admirante la belaĵojn, kiuj sin prezentis al mi, kaj — iom enviante mian gastiganton, kiu ĉiutage povas ĝui tion.

Kelkafoje dum la printempa sezono li havas gastojn, parencojn kaj konatojn el Svislando kaj Germanujo, kaj tiam estas iom pli vive en la domo. Kun sincera sindonemo s-ro *Borel* dediĉas sin al siaj gastoj, farante ekskursojn kun ili kaj montrante al ili la vidindaĵojn de la tiea regiono. Ankaŭ kun mi li ĉiutage ekskursis en la ĉirkaŭaĵon. Ni migris

tra olivarbaj plantejoj kovrantaj la montojn, ni vizitis la interesan fiŝist-urbeton Camogli, la luksan banlokon Santa Margherita, la nekompareble belan lokon Portofino Mare kaj la montosupron Portofino Kulm, de kiu oni ĝuas „la plej belan perspektivon de l' mondo“. Mi ne havas ĉi tie sufiĉe da loko por detale priskribi ĉiujn rimarkindaĵojn kaj belaĵojn, kiujn mi vidis; nur pri du mi volas raporti.

En Santa Margherita mi vidis la hotelon, en kiu la sovjetaj popolkomisiitoj en la jaro 1922 loĝis dum sia traktado kun la germana komisiono (sub la gvidado de la poste murdita ministro Rathenau) pri la konata kontrakto de Rapallo. Ĝis tiam mi pensis, ke la gvidantoj de la komunistoj antaŭ ĉi por si mem aplikas la antiprincan doktrinon, kiun ili proklamas al siaj anoj, nome la egalecon de ĉiuj homoj. Ho, mi naivulo, kiom mi eraris! La „egal-ecemo“ de la rusaj „popolkomisiitoj“ en Santa Margherita konsistis en tio, ke ili elektis por si la plej luksan hotelon, havantan ĝuste la nomon „Imperial“ (!), ke ili vivis tie kiel veraj princoj kaj ĉirkaŭis sin per granda stabo de militistaj gardantoj, kiu izoligis ilin de la „ordinara popolo“. Jen teorio kaj praktiko! Ankaŭ la komunistaj gvidantoj imitas la „malbenitan“ sistemon de malegaleco, se koncernas ilin mem.

Tre amuza epizodo okazis sur Portofino Kulm. Multe profundiginte en la belega aspekto de la pejzaĝo, mi staris tie supre kun s-ro Borel. Subite ni aŭdis post nia dorso germanlingvan interparolon de tri sinjorinoj. Ili diskutis pri la nomoj de la lokoj videblaj en la valoj kaj ĉe la marbordo. Ĉar ili ne venis al interkonsento, mi proponis al s-ro Borel, ke ni helpu ilin, donante la deziratajn klarigojn. Li konsentis, kaj ni turnis nin al la trio: du maljunetaj sinjorinoj kaj juna fraŭlino. Dankeme ili akceptis nian helpon. S-ro Borel faris la necesajn klarigojn en germana lingvo, dum li kaj mi parolis nur en Esperanto. Post kiam ili estis sufiĉe bone informitaj, la interparolado daŭrigis pri aliaj temoj, precipe pri la deveno de ĉiu el ni.

„Vi estas Hamburg-anino, ĉu ne?“ mi diris al unu el la sinjorinoj.

„Jes! Sed de kie vi scias tion?“

„Nu, via dialekto ankaŭ en eksterlando ne malrekoniĝas.“

Nun la sinjorinoj demandis s-ron Borel: „Ĉu vi estas franco? Vi aspektas kiel tia kaj ankaŭ havas francan akcenton en via parolmaniero.“

„Ne, vi eraras.“

„Nu, ĉu eble franclingva svizo? Cetere, kiun lingvon vi parolas kun la alia sinjoro?“

„Ĉi tiun fojon vi ĝuste divenis mian naciecon. La lingvo, kiun mi parolas, estas Esperanto.“

Sekvis mallonga klarigo pri nia internacia lingvo.

„Ho, pri Esperanto mi jam aŭdis“, diris la alia sinjorino, kiu prezentis sin kiel Wien-anino kun sia nevino, „en nia urbo okazos internacia Esperanto-kongreso en la nuna jaro.“

„Jes“, mi diris, „kaj mi verŝajne partoprenos la kongreson.“

„Ho, tiam vizitu min en Wien! Mi estas la edzino de registara konsilisto H. Ni loĝas en A.-G.-Gasse, numero . . ., telefono numero . . .“

Kun danko mi akceptis la afablan inviton.*) Dum kiam mi parolis kun la du Wien-aninoj pri ilia urbo kaj pri la Kongreso, la Hamburg-anino konversaciis kun s-ro Borel. Ŝi demandis lin pri lia naskiĝ-urbo. Li nomis ĝin. Surprizite ŝi ekkriis: „El la sama urbo devenis mia avino patrinflanka!“ Kaj ŝi diris la familian nomon de la avino.

„Ĉu vere?“ Nun s-ro Borel estis surprizita. Ankaŭ lia avino patrinflanka havis la saman nomon! Unu demando reciproke sekvis la alian, kaj fine estis klare, ke la Hamburg-anino kaj s-ro Borel estas — gekuzoj, ja iom malproksimparencaj, tamen devenantaj el la sama familio! Tio estas vere kurioza, ĉu ne? La mondo estas grandega kaj tamen malgranda: parencoj, kiuj neniam vidis unu la alian kaj eĉ ne scias ion reciproke pri si, rekontiĝas en fremda lando ĉe la „plej bela panoramo de l' mondo!“

* * *

En Recco mi ricevis poŝtkarton de Dro Schmuckher el Genova. Li bedaŭris, ke li ne povis akcepti min dum mia alveturo en la stacidomo de Genova kaj ankaŭ ne povis sendi alian samideanon, ĉar li estis forvojaĝinta. Sed li afable promesis sian helpon al mi, kiam mi reveturante denove trapasos Genova-n. Do mi anoncis al li tagon kaj horon de mia reveno. Sed alveninte mi ree atendis en kaj antaŭ la stacidomo pli ol duonan horon, — neniu venis. Estis sunbrila posttagmezo, kiun mi uzis por sola travagi kaj rigardi la treege interesan urbon kaj ĝiajn ĉefajn vidindaĵojn. Per dentrada fervojo mi suprenveturis ankaŭ la monton Righi, fame konatan rigardejon kun bona restoracio. Tie supre staras ankaŭ malnova fortikaĵeto ne plu uzata. Ĉe ĝia enirejo sur la tero sidis italo kun „Petit Monte Carlo“, t. e. hazardludo konsistanta el tri kavaĵoj kaŝtan-duonsferoj kaj unu globeto, kuŝantaj sur gazetfolio. La globeton li metis sub unu el la duonsferoj, kiujn li poste intermiksas, parolante ĉe tio iun „sorĉan formulon“. Paginte ludmonon de 100 Liroj, oni divenu la duonsferon, sub kiu la globeto kuŝas. Kiu divenis ĝuste, ricevis la duoblon de la pagita sumo, alikaze la enpago kompreneble estis perdita. Longan tempon mi observis la ludadon. La ĉefaj ludantoj estis tri distingite aspektantaj italoj kun iu ordenrubando en la butontruo. Ili preskaŭ ĉiam gajnis, kio ŝajnis al mi tute komprenebla, ĉar precize observante la intersoviĝon, oni facile povis diveni la ĝustan duonsferon. Ankaŭ mi, pasive partoprenante la ludadon, preskaŭ neniam eraris. Tamen mi estis suspektema kaj ne partoprenis aktive, kvankam alia italo, staranta apud mi, senĉese provis inciti ludpasion en mi. Sed mi kontraŭstaris, kaj tio estis prudenta! Preteriris ankaŭ multaj fremduloj, precipe germanoj, kiuj ne estis tiel singardemaj kiel mi. Ili ludis unu, du kaj pliajn fojojn kaj ĉiam perdis, kvankam ili laŭ mia observo divenis la ĝustan duonsferon. Se iu ne plu havis italan monon, la ludestro tre volonte akceptis ankaŭ 20 Rentenmark kiel enpagon. Evidente li estis trompisto. Sed por ke nespertulo ne rimarku tion, interludis ankaŭ la tri „distingitaj“ italoj kaj kompreneble gajnis. Fine mi ne pli longe plu povis mute rigardi la trompadon kaj avertis miajn samlandanojn, komunikante al ili miajn ob-

*) Mi efektive vizitis la sinjorinon dum la Kongreso kaj estis tre afable akceptata. Eko

servojn. Rimarkante tion, la ludestro kun malbeno furioze enpakis sian „Petit Monte Carlo“ kaj rapide foriĝis. Ankaŭ la italaj kunludantoj kaj instiganto ne pli longe restis sur la scenejo de sia agado. Poste mi eksciis de germana sinjorino, kiu ofte estas en Genova por viziti parencojn, ke tiuj trompisto sur Righi jam de jaroj praktikas sian profitodonan ludadon kaj ŝajne ne estas kaptataj de la itala polico.

Kiam vesperiĝis, mi serĉis la loĝejon de Dro Schmuckher kaj feliĉe trovis lin hejme. Mia sciigo pri alveno kuŝis sur lia skribotablo kaj laŭdire alvenis nur ĵus antaŭ la anoncita horo (kvankam mi forsendis ĝin du tagojn antaŭe el Reeco, dudek kilometrojn de Genova!). Kiel multe okupita advokato li ne mem povis veni al la stacidomo kaj eĉ ne havis tempon por telefone venigi iun alian. Li petis mian pardonon pro tio, kaj mi kompreneme senkulpigis lin, ĉar mi scias, ke plenumo de promeso sufiĉe ofte estas vanigata per neantaŭvideblajoj...

Laŭ konsilo de Dro Schmuckher mi pasigis la vesperon en granda variete-teatro. Sed anstataŭ la esperitaj varieteaĵoj mi vidis la unuan prezentadon de itala opereto. Kvankam mi komprenis nur malmulton de ĝia teksto kaj nur el la ludado povis iom diveni ĝian sencon, la prezentado tamen estis interesa por mi, ĉar ĝi montris al mi la muzikemon de la itala popolo, kiu en la aŭskultejo kvazaŭ kunludis kaj kelkafoje eĉ kunkantis efikajn melodiojn.

En Italujo la teatroprezentadoj ĝenerale komenciĝas tre malfrue kaj pro tio ne finiĝas antaŭ noktmezo. Estis jam post la dekdna, kiam mi eliris el la teatro. Mia vagonaro estis forveturonta kvaronon antaŭ la tria horo nokte. La tempon ĝis tiam mi intencis pasigi en la atendejo de la stacidomo. Sed, ho ve, ĝi estis fermita! Kaj ankaŭ la restoracioj jam fermis siajn pordojn. Nu, estis varma nokto, invitanta al promenado. Ĉi tiun mi faris dum du horoj, tiamaniere konatiĝante ankaŭ kun la dumnokta vivo de Genova. Ne multe atentante la vojon, mi venis ankaŭ en la havenan kvartalon, tra mallarĝaj stratoj kaj stratetoj. Sed tio estis riska, ĉar tiu kvartalo, same kiel en aliaj havenurboj, estas iom danĝera por fremdulo. Sed ne atentante la oftajn alparolojn de „afablaj sinjorinoj“, mi evitis malagrablajojn kaj sendifekte revenis al la stacidomo por eniri la vagonaron portontan min al Milano. De tie mi havis rektan vagonon al Stuttgart, kie mi volis viziti profesoron Christaller.

La reveturo tra Svislando, sur Gotthard-fervojo, estis raviga. Nur kiam mi veturis tra Bellinzona kaj vidis tie la restaĵojn de la terura fervoja akcidento okazinta antaŭ unu semajno, mi profunde malĝoĝiĝis, pensante al la multaj viktimoj, kiujn ĝi postulis...

Kiam mi vespere alvenis en Stuttgart, mi miris, ke profesoro Christaller, kvankam mi per sufiĉe frue forsendita poŝtkarto estis petinta lin pri tio, ne atendis min en la stacidomo. Rapide mi serĉis loĝejon en proksima hotelo kaj tuj poste per tramo veturis al la loĝejo de s-ro profesoro. La tuta domo estis senluma. Ĉu li jam dormis? Mi sonor-igis. Fenestro en la unua etaĝo malfermiĝis, kaj la ŝatata profesor-edzino demandis el ĝi: „Kiu estas tie?“ Mi diris mian nomon, kio estis re-

spondata per mir-ekkrio. Tuj la afabla profesoro malsuprenvenis kaj malŝlosis la dompordon.

„Kia surprizo!“ li diris, „mi tute ne atendis vin hodiaŭ.“

„Ĉu vi ne ricevis mian poŝtkarton?“

„Ne!“ Do ĝi perdiĝis, same — kion mi poste eksciis — kiel kelkaj aliaj, kiujn mi skribis el Italujo.

Ni preparolis niajn aferojn, kaj poste profesoro Christaller nepre ne volis, ke mi iru sola al la hotelo. Piedire li akompanis min ĝis tie en la malfrua vespero, kaj mi ne sciis, kiom danki lin pro tiom da afableco.

Plenega je neforgeseblaj impresoj mi revenis hejmen, kaj mi esperas, ke mi ne tedis la legantojn per la babilado pri miaj personaj travivaĵoj.

* * *

Intertempe okazis la XVIa Kongreso en Wien. Atendante de mi la kutiman raporton pri ĝi, oni eraris. Mi lasis la raportadon al aliaj, eble pli kompetentaj kunlaborantoj. Kial? Nu, por esti objektiva raportanto, mi devus diri tro multe da malagrablajoj, kaj tio ja ne estas ŝatata en Esperantujo. Ju pli multe da veraĵoj oni diras, des pli malbona samideano oni estas...

F. Ellersiek

Esperanto kaj Homaranismo

De F. Christanell

En „Germana Esperantisto“ (Aŭg.-Sept. 1924) troviĝas germanlingva artikolo pri la interna ideo de Esperanto, represita el „Arbeiter-Esperantist“. La redaktoro mem rimarkigas, ke li ne en ĉiuj punktoj konsentas, sed tamen volas represigi ĝin, ĉar li volas substreki la kernon: „ke ne la interna ideo — se ĝi ankoraŭ estas menciinda — sed la praktika flanko sukcesigos fine nian aferon“. Kvankam ankaŭ mi en multaj punktoj samopinias kiel la aŭtoro kaj la redaktoro, mi tamen devas protesti — kaj verŝajne en konsento kun multaj samideanoj — kontraŭ tia maniero pritrakti la internan ideon, kvazaŭ ĝi estus malbona kaj forigenda. Do estu permesate, pliklarigi kelkajn punktojn.

En la citita artikolo troviĝas kelkaj troigoj, per kiuj estiĝas malveraj asertoj, ekzemple la frazoj: La anoj de la interna ideo opinias, ke „la ideo de mondlingvo estas identa kun popolinterfratiĝo“. — Zamenhof opiniis, „ke komuna lingvo malebligis malamon inter diversaj popoloj“. — „Kion Zamenhof travivis en Bialystok, ke anoj de diversaj gentoj interbatalis, ne estis sekvo de lingva diverseco.“ El tiaj frazoj la aŭtoro volas pruvi, ke Zamenhof grave eraris, kaj kvankam ni al tiu ĉi eraro dankŝuldas la eltrovaĵon de Zamenhof, tamen tiu ĉi eraro malhelpis lin mem, iri la ĝustan vojon. Nur devige li iom post iom cedis, ĝis kiam li fine 1912, je Kongreso en Krakau, rezignis pri la estreco, komprenante, ke la lingvo mem ne povas esti la disvastigilo por la Homaranismo.

Sendube Zamenhof estis bonkora idealisto, sed li estis samtempe homo kun tre praktika menso. Pli profunde, ol la aŭtoro ŝajnigas, li komprenis la cirkonstancojn en sia hejmurbo. Oni nur legu atente la „leteron pri la deveno de Esperanto“, kaj oni rimarkos tion. Laŭ opinio de Zamenhof precipe pro la malklereco de la popolaj amasoj

sukcesis demagogoj, per malveraj frazoj akiri grandan anaron kaj instigaĉi la naciajn grupojn unu kontraŭ la alia. Zamenhof vidis, kiel homoj simplaj kaj bonkoraj furioze batalis kontraŭ aliaj ankaŭ simplaj kaj bonkoraj, kiujn ili ne konis, sed nur opiniis, ke ili devas esti malamikoj, ĉar ili apartenis al alia grupo kun alia lingvo. Li sentis, ke — se tiuj povus interrilati — ili forĵetus la malverajn antaŭjuĝojn kaj povus vivi kune kiel amikoj. Do li klopodis, kompili lingvon ne nur lerneblan por kleruloj, sed kiom eble simplan, por ke ankaŭ simplaj homoj povu ĝin uzi. Do la praktika sento kondukis lin al la ĝusta fundamento de internacia lingvo. Pro praktika sento li ankaŭ komprenis, ke lia sistemo devas esti elprovita antaŭ ol li ĝin publikigos. Do persista laboro kondukis lin al la konvinko, ke li nun ne plu devas timi la kritikon, kaj bone sciante la sekvojn por sia privata vivo, li kuraĝis fari la decidan paŝon. Krome li jam de komenco komprenis, ke internacia lingvo devas iĝi vivanta lingvo, sekve esti propraĵo de ĉiuj uzantoj; tial li jam antaŭ la publikigo sciis, ke li devos rezigni pri rajtoj de l' eltrovinto, kaj jam 1888 en la „dua libro“ li trovis oportune, ĉi tion publike sciigi. Nur pro la sintenado de la anaro li estis devigata, unuflanke kelkan tempon ludi la rolon de majstro kaj aliflanke ree kaj ree deklari, ke por natura evoluo de Esperanto krom daŭra fundamento estas nepre necese, ke restu certa grado de libereco, pro kio li ne volas esti majstro, sed nur konsilanto, kiom longe necesas. Rilate al la interna ideo, Zamenhof jam de komenco komprenis, ke, kvankam la lasta kaj plej profunda celo estas la Homaranismo, tamen la unua kaj ĉefa celo devas esti la disvastigo de Esperanto por praktika uzo. Li mem de komenco serĉis kaj rekomendis formojn por plej baldaŭa praktika uzado de la lingvo. Por ke troa akcentado de la interna ideo ne malhelpu la disvastigon de la uzado, li mem ĝustatempe proponis la Deklaracion, per kiu Esperanto kiel neŭtrala ilo por diversaj celoj estas laŭprincipe disigata de la direkta propagando por la Homaranismo. Li povis fari tiun paŝon sen ŝanĝi sian opinion, ĉar li sciis, ke laŭ psikologia naturleĝo la disvastigon de Esperanto sekvas disvastigo de homarana sento. Homoj, kiuj interrilatas per Esperanto kun aliaj fremdaj homoj, kiuj havas alian vidpunkton, iom post iom korektos sian vidpunkton kaj forigos el sia opiniaro malprudentajn antaŭjuĝojn rilate al la anoj de alia ĉu nacio, ĉu religio, ĉu partio. Pro peresperantaj interrilatoj iom post iom per si mem kreskos la tuthomara klereco. Oni komprenos, ke ne la aneco al iu ajn sistemo religia aŭ nacia aŭ politika estas la distingilo pri la boneco aŭ malboneco de la homoj, sed ĉefe la interna karaktero de la unuopaj homoj. Per tiaj spertoj oni lernos kompati la erarantojn kaj kontraŭbatali ne la homojn, sed la malverojn kaj maljustajn opiniojn. Tiel la ideo, ke ĉiuj homoj estas homoj fundamente egalrajtaj, per si mem profundigos en la koroj kaj mensoj de bonvolemaj homoj kaj kondukos al stato, en kiu justeco kaj natura amo al homaj gefratoj pli kaj pli regos la diversajn interrilatojn. Nur por plicertigi tian efikon kaj por pli rapide atingi ĝin, li akcentis la Homaranismon speciale. Ĉu Zamen-

hof opinias, ke lia nobla celo, la plena interfratiĝo de la homaro, iam estos atingebla, pri tio mi ne povas respondi, sed laŭ lia persistema agado malgraŭ multaj malhelpoj mi konkludas, ke li komprenis, ke jam estas granda beno por la homaro, eĉ se la celo nur parte estos atingebla. Do mi konstatas, ke Zamenhof ne nur laboris kiel bonkora idealisto, sed kiel celkonscia praktikulo, uzante persiste kaj saĝe la necesajn ilojn, por inaŭguri novan progreson de tutmonda kulturo por granda beno al la tuta homaro. Zamenhof ne eraris, irante antaŭen nur paŝon post paŝo, ĝis kiam pro konsumiĝo de siaj fortoj li devis konfidi sian komencitan verkon kiel valoregan heredaĵon al aliaj homoj, kiuj scias ĝin daŭrigi laŭ sama maniero.

Malkaŝe mi konfesas, ke mi ne kredas la plenan venkon de Homaranismo, konsistanta en tio, ke ne plu intencas unu grupo de homoj perforte subigi la alian pro diverseco de opinioj aŭ pro celoj de malica kaj false komprenita egoismo. Mi esperas, ke multaj antaŭjuĝoj estos forigataj kaj malhelpataj per interkompreno kaj pli vigla interrilato; multaj troigaj opinioj povos esti korektataj per aŭskultado de opinioj, kiujn havas aliaj. Per Esperanto ne nur plifaciligas la interrilatado, sed ĉefe, kiam Esperanto estos enkondukita en la lernejojn, plialtiĝos ĝenerale la klereco de la homaj amasoj. Ili fariĝos pli memstaraj rilate al la prijuĝo de opinioj. Do multaj aferoj, kiuj nun pro celkonscia, ofte malica incitado kondukas la amason al freneza stato de blinda malamo, estos kondukataj en pure spirita interbatalo al prudenta kompromiso kaj reciproka justeco. Sed aliflanke mi opinias, ke la egoismo ofte estas pro pasioj tiom blinda, ke oni eĉ la veran propran profiton ne povas vidi kaj tial estas preskaŭ ne korektebla. Krome valoras la naturleĝo de inerto aŭ malvigleco ne nur en la fiziko, sed eble eĉ pli en psikaj aferoj, aŭ per pli simplaj vortoj: kleruloj kaj bonvolaj homoj ne laboras tiom, kiom ili devus kaj povus. Kultura progreso laŭ la ideo de Zamenhof do nur estas realigebla ĝis certa grado, kiu ne mezuriĝas laŭ bezonota energio, sed nur laŭ disponebla energio. Do oni ne troigu la valoron de Homaranismo, sed oni ne malsatu ĝin, ĉar eĉ nur parte realigite ĝi jam estas grandega beno por la homaro kaj helpas atingi la plej eblan tuthomaran feliĉon. Sufiĉas la turmentoj, kiujn ĉiu homo devas sperti pro malforteco de sia kaduka korpo; ni klopodu, ke ne krome unu malprudente turmentu la alian.

Kio devas esti la praktika uzado de la interna ideo por plua varbado de nova anaro? Ni ŝatu kaj komprenu la agadmanieron de Zamenhof kaj imitu lin, tiel ni plej bone kunlaboras en la disvastigo de Esperanto kaj samtempe en granda progreso kultura. Interkonsente ni laboru por disvastigo de Esperanto per ĉiuj taŭgaj rimedoj sen ĵaluzaj flankenbatadoj. Unue oni devas konstrui la domon, poste oni povos en ĝi loĝi. Pro nura praktika vidpunkto ĉiu Esperantisto devas deziri disvastigon. Ju pli da homoj scipovas Esperanton, des pli grandan utilon ĉiurilate havas la unuopaj Esperantistoj. Ne estas necese laŭ la intencoj de Zamenhof, ke oni metu antaŭ ĉion la internan ideon. Oni propagandu Esperanton precipe per akcentado de la praktika utilo, ĉar tio ĉi havas ĉie la plej grandan

propagandan efikon. En propagandparoladoj, en varbartikoloj, en komencaj kursoj tute ne estas necese, tuŝi la internan ideon. Oni nepre restu ĉe la Deklaracio, ke ĉiu ajn uzanta Esperanton laŭ la fundamento estas plenrajta Esperantisto. Sed oni ne penadu, forigi la internan ideon aŭ malpermesi ĝin al anoj de speciala direkto. La ĝuste komprenata Homaranismo estas sendanĝera kaj tute ne malhelpas la aliajn celojn, kiujn apartaj grupoj volas prosperigi pere de Esperanto. Oni ne timu, ke anoj de la interna ideo pro tia aneco estas malpli bonaj filatelitoj, katolikoj aŭ socialistoj. Ĉiuj movadoj trovas inter la anoj de la Zamenhof-a ideo certe fervorajn propagandistojn. Bona ideo varbas per konvinko, sed ne per altrudo. Kaj se per ilia kunlaboro kelkaj troigoj malaperos, la partio ne malgajnas, precipe ĉar oni povas kalkuli, ke sammaniere ankaŭ ĉe la kontraŭula flanko okazas la samo. Troigado kaj perforto nur sekvigas kontraŭan troigadon kaj perforton. Maljusta sukceso neniam povos havi daŭran valoron. Homaranismo ĉiurilate kunlaboras, por ke ĉiuj justaj postuloj estu plenumataj laŭ plej eble bona maniero. Tial la interna ideo ne estas forigenda, sed meritas plenan subtenon de ĉiuj flankoj.

Do ankaŭ estonte en Esperantistaj grupoj, precipe en neŭtralaj grupoj, oni parolu pri ĝi, sed sen troigado. Por profundigi la konon de Esperanto kaj ties esencon en kursoj por perfektigo kaj en pli altaj klasoj de lernejoj ne prisilentu ĝin; oni spertos, kiel ĝis nun, ke la plej fervoraj propagandistoj estas tiuj, kiuj ne nur pro persona utilo pleadas por Esperanto, sed la idealistoj, kiuj scias, ke estas la plej nobla devo kunlabori por la progreso de la kulturo kaj la tuthomara feliĉo. Kiel ĝis nun ankaŭ estonte la Esperantistaro kantu kun entuziasmo la belan himnon „La Espero“, en kiu Zamenhof tiel bele klarigis la programon de „nia diligenta kolegaro“. Ni estu kaj restu veraj kavaliroj de la verda stelo!

Esperanto-Movado

Raportoj por ĉi tiu fako estu sendataj ĝis la 15a ĉiunonata por la sekvanta numero (neniukaze pli malfrue!). La redakcio speciale preferas raportojn pri kursoj (ankaŭ en lernejoj!), publikaj paroladoj, grupfondiĝoj k. s. Malpli gravaj aferoj, ekz. festoj, ekskursoj k. s. povas esti citataj ĉi tie nur mallonge.

Mallongigoj: LG = Loka grupo de G. E. A., O = oficejo, P = prezidanto, VP = vicprezidanto, S = sekretario, K = kasisto, B = bibliotekisto, G = gvidanto de kurso, Pa = partoprenantoj.

Germanlingvaj Landoj

GERMANUJO

Bad Reichenhall. *Esperanto Kartelo.* Kunveno ĉiun jaŭdon en la gastejo Pfaffenberger, Gruttensteing. 9; gastoj ĉiam kore bonvenaj. Informojn donas: Heinrich Raab, Wittelsbacher Platz 7.

Bamberg. Supera poŝtkonsilisto Reber finis kurson en „Philosophisch-theologische Hochschule“ (filozof-teologia altlernejo). La Franka E-Ligo sub prezidanteco de s-ro Reber komenciĝis vivi denove.

Berlin. *Gruparo.* La konata eldonejo Rudolf Mosse nun faras grandegan reklamon por Esperanto en ĉiuj siaj ĵurnaloj (Berliner Tageblatt, Berliner

Morgenzeitung, Berliner Volkszeitung) kaj en aliaj gazetoj, kies anoncan parton ĝi administras. La firmo vendas ankaŭ Esperantajn librojn kun bona sukceso. De post la 20a de Septembro Berliner Tageblatt ĉiusemajne (sabaton vespere) enhavas du-paĝan Esperanto-aldonon; Berliner Morgenzeitung kaj Berliner Volkszeitung ĉiusemajne po unu paĝo. Ĉiuj aldonoj estas redaktataj de nia malnova samideano Dro Kliemke. Interese estas, ke la firmo Mosse mem sin turnis al Dro Kliemke, ĉar per la sciigoj pri la Radio-Konferenco en Genève (Paskon nunjaran) ĝi konvinkiĝis pri la taŭgeco kaj neceseco de E. Dro Kliemke publikigis ankaŭ diversajn propagandajn artikolojn en Berliner Tageblatt, kaj pluaj sekvos. Jen sukceso vere grava, pri kiu la germanaj Esperantistoj intense atentigu la publikon, uzante la koncernajn gazetnumerojn kiel propagandilojn! — Ankoraŭ alian gravan sukceson ni atingis en Berlin: la privata komerca lernejo de Flatauer, unu el la plej grandaj de sia speco, la 1an de Oktobro komencis grandstilajn E-kursojn kaj fondis specialan E-lernejon, kiu nomiĝas Esperanto-Schule des Esperanto-Verbandes Berlin (E-lernejo de E-Gruparo Berlin). La estro de la lernejo, direktoro Flatauer, estas interesigita pri E ankaŭ de Dro Kliemke. — Fine la Berlin-a Gruparo intertraktas ankaŭ kun la Radio-sendstacio en Königswusterhausen pri E-disaŭdiĝoj kaj esper-eble baldaŭ sukcesos rilate la efektivigon. Detalojn pri tio ni supozeble povos publikigi en la venonta numero. — 4. 8. senĝena salutvespero por la partoprenintoj de la kongreskaravano al Wien. Gastoj el Danujo, Svedujo, Anglujo kaj nordgermanaj urboj. Parolis s-roj Blankenheim, Schiff kaj Wallon. La karavanon partoprenis 63 personoj. Dankon al la organizinto, s-ro Blankenheim! — 19. 8. raportoj pri la XVIa. — 2. 9. pliaj raportoj de f-ino Nickel, s-roj Glück, Markuse kaj Hitrov. S-ro Pankratz, Bromberg, parolis interese pri polaj E-aferoj. — 16. 9. s-ro Behrendt parolis pri „E kaj Ido“.

Bremen. *Vendreda Klubo Bremen* laŭ ekzemplo de Vendreda Klubo Leipzig estis fondata je 6. 9. Celo: serioza, celkonscia laborado por progresigo de la E-movado. P s-ro Heino Heitmüller. Laborvespero: ĉiu 2. kaj 4. lundo en monato. S s-ro H. Barkhausen, Fiegenstr. 11.

Chemnitz. *Esperantistaro.* Prof. Dro Wicke malfermas kurson por progresuloj, ĉiumarde je la 8a en „Arnolds Theatergarten“. — Fondiĝis „Esperanto-komercejo“ de Hellmut Pfitzner, Theaterstr. 116. — E estas akceptita en la plano de la Ch. Volkshochschule (popolaltlernejo). La 7an de Oktobro prof. Dro Wicke komencas siajn E-prelegojn kaj ekzercojn. Oni povas deklari aliĝon ĉe prof. Dro Wicke, Chemnitz-Gablenz, Ostheim 10, aŭ ĉe direktoro stud. kons. Dro Keller, Chemnitz, Wörthstraße 36.

Cleve. 3. 8. vizito de 40 gastoj el Nijmegen. Gvidado tra la urbo, festkunveno en hotelo „Monte Bello“. S-ro Schuhmacher parolis pri „E kaj gepatra urbo“. Poste humoraj reprezentadoj.

Dresden. *Loka Unuiĝo.* 30. 7. La kunvenon vizitis du angloj. S-ro Karsch adiaŭis s-ron Krestanoff, kiu faris sian lastan paroladon, dankante por la amikeco. S-ro Karsch dankis s-ron Naumann,

Großenhain, por la farita de li dum jaroj laboro por la gazetara servo. Fine babilado de s-ro Schramm pri Dresden-aj vidindaĵoj. — 27. 8. raporto de f-ino Zschepank pri la XVIa. Rezolucio al G.E. esprimanta la nekontentecon kun enhavo kaj ideo de la artikolo pri la „interna ideo“. — En „Komercesta Grupo Dresden“ oni akceptis 13. 9. rezolucion, kiu ne konsentas en ĉiuj punktoj kun la rezolucio de la loka unuigo Dresden.

Ebersbach (Lausitz). 13. 7. Amika Kunveno de distriktaj E-grupoj. Oni decidis sendi reprezentonton al Chemnitz por fondi Saksan Ligon. Oni kunigas la propagando-materialon de ĉiuj Luzaciaj E-grupoj en granda migranta ekspozicio. Prof. Göhl pri-traktis la gazetan servon.

Elberfeld. Rektoro Trarbach gvidas kurson kun lernantoj de la du realgimnazioj kaj kurson ĉe laboristoj. Li estas petita, fari kurson en komerca lernejo en Barmen.

Fulda. Studkonsilisto Dro Westenberger, membro de la Esperanto-Societo Fulda, de post kelka tempo instruas Esperanton al 12 lernantoj de la ĉi-tiea supera reallernejo. Kurso por lernantoj de la gimnazio, ankaŭ direktota de Dro Westenberger, komenciĝos post la aŭtuna libertempo. Okaze de la distrikta instruista kunveno, okazinta antaŭ nelonge en Fulda, s-ro Dro Westenberger faris propagandan paroladon pri Esperanto kaj disdonigis flugfoliojn al la ĉeestantaj geinstruistoj. La sukceso estis, ke 22 instruistinoj kaj instruistoj decidis lerni Esperanton. La kurso, direktota de Dro Westenberger, baldaŭ komenciĝos. La ĉeestantoj estis ankaŭ instigitaj de s-ro instruisto Urbach el Ellers (distrikto Fulda) per tio, ke li neatendite konatigis sin kiel Esperantiston kaj diris, ke li jam de post 2 jaroj kun bona sukceso instruas Esperanton al lernantoj de sia vilaĝo.

Görlitz. En Aŭgusto sup. studkons. prof. Dettloff komencis kurson kun 16 lernantoj de supera reallernejo. — En la ĉi tiea „Freiweltliche Schule“ (Libermonduma lernejo) instruas s-ro Ripke 40 infanojn pri E.

Hamburg-Altona. *Loka Unuigo.* 4. 9. raportis s-roj Krüger (Verda Stelo) kaj Schünemann (Hamburg) pri la XVIa.

Heilbronn. LG. Kunvenoj de „E-konversacia rondo“ ĉiujauĉe, je la 8a, en restoracio Wengert, Karlstr. 83. Ĉiun lastan jaŭdon en monato kunveno de LG. P s-ro Friedrich Bachmann, Bahnhofstr. 5.

Kaiserslautern. LG. Fondiĝo de grupo de GEA kun 22 membroj. P s-ro Karl Römer, S s-ro Richard Hauber, K s-ro Richard Kremling. O Ottostraße 1. Kunvenoj ĉiumerkrede je la 8a en restoracio Föhner, Glockenstr. 67. — 7. 9. kunvenis preskaŭ cent gesamideanoj el dek naŭ lokoj. Prezidis s-ro Omlor (St. Ingbert). Parolis s-ro Gerlach pri movado en Kaiserslautern, s-ro Krämer (Saarbrücken) pri franca kongreso en Straßburg, s-ro Schönrich (Wiesbaden) pri la dekreto de l' prusa ministro, s-ro Scheidt (Kreuznach) pri la XVIa, s-ro Omlor pri la praktika flanko de E. Post komuna tagmanĝo okazis fotografado kaj amuza parto de la kunveno. Belega tago en Esperantujo!

Kirchweyhe b. Bremen. LG. 16. 7. fondiĝis loka grupo de GEA. P s-ro Lankenau. 21 membroj.

Köln. LG. *Neŭtrala E-istaro 1906.* La ekzerc-vesperojn gvidis 13. 8. s-ro Seidenberg, 20. 8. s-ro Wingen, 27. 8. s-ro Junker, 10. 9. f-ino Gäbler, 17. 9. s-ro Wilbert. — 4. 10. grandstila fondiĝofesto en Rheinpark. — 20. 10. okazos kunveno de la estraro de ĉiuj ĉi lokaj E-grupoj pro fondiĝo de E-kartelo.

Leipzig. De post Septembro de radio-stacio disaŭdigas E-kurson. — Dum la Socialista Kultur-semajno la laborunuigo de socialdemokrataj instruistoj aliĝis al Socialista Edukista Internacio kaj faris rezolucion pri certigo de permeso de E kiel libera fakto en superaj klasoj de popollernejoj.

Lennepe. Kurso en la supera lernejo.

Leutersdorf. LG. En la lasta kunveno oni fondis lokan grupon de GEA. Nova kurso estas preparata.

Magdeburg. La kunvenoj nuntempe havas lokon ĉiun lundon je la 7a en la flave-ruĝe-verde-blue striita ĉambro de hotelo „Weißer Bär“. Novajn kursojn komencis ges-roj Michaelis, Fuhrmann, Möhser kaj Küster. La 26an de Septembro okazis granda publika propaganda parolado de s-ro Glück el Berlin en salonego de „Louisenschule“. En la Komerca Lernejo de A. Bruck Esperanto nun apartenas al la instruataj fakoj.

Nürnberg. *Loka Grupo.* 6. 10. 24: Instruado de s-ro Schlicht; 13. 10. 24: Parolado de f-ino Knappe; 20. 10. 24: Instruado de s-ro Pilhofer; 27. 10. 24: Rakontetoj de f-inoj Böhm, Schlenk kaj Kleider.

Nürnberg-Fürth. *Kartelo.* Vendredon 3. 10. 24: Kunsido de la delegitoj kaj de la labora komisiono en la oficejo. Merkredon, 8. 10. 24: Kartelkunsido. Raporto pri ekzamenoj, propagando, kursoj, amusaĵoj.

Radebeul b. Dresden. LG. 31. 5. E-Printempa festo. De post 14. 5. kurso por komencantoj.

Saargebiet. La E-Ligo Saar-teritorio aranĝis 27. 7. arbaran amuzaĵon kun teatraĵoj, kantoj kaj muzikaĵoj en naturscenejo. Gastoj el Kaiserslautern, Zweibrücken kaj Straßburg. Prezentiĝis „Das heiße Eisen“ (La varmega feraĵo) de Hans Sachs, en E la ŝerca dramo „La reĝino de Saba“.

Seiffhennersdorf. 23. 7. la lerneja komitato permesis al la sindikata kartelo, uzi lernejan ĉambron por aranĝi E-kurson porinfanan en Oktobro.

Schwenningen. E-kurso de s-ro Martin Prestele, Lorch.

Stuttgart. 28. kaj 29. 7. Dro A. Vogt faris radioparoladon pri kaj en E.

Teuchern. 9. 8. kurso komenciĝis.

Zittau. Juna teknikisto el Hamburg trapasis la urbon, irante perpiede al Philippopel, kie li okupos postenon en elektrejo, akiritan per E. — Invitite de s-ro F. Emil Heikkinen en Vainikkalaa, s-ro K. Ullrich vojaĝis al Finnlando. — Post la somerferioj komenciĝis en Herrlich's Handelslehranstalt (komerca lernejo de Herrlich) E-instruado por la lernantoj de la tuttagaj klasoj. La Ministerioj por Ekonomio kaj por Internaj Aferoj aprobis, ke s-ro Knöfel instruu.

LIBERA URBO DANZIG

El la raporto pri la unua duonjaro 1924: 92 membroj, samtempe anoj de U. E. A. La Asocio aliĝis al „Danziger Verein der Rundfunkfreunde“. E-kurso de s-ro B. Aeltermann en popola altlernejo. Kurso en polielernejo kun 40 Pa. La loka gazetaro estas favora al E. La Asocio subtenis la estraron de la foiro. 10 firmoj anoncas en E-gazetoj kaj en E-adreslibro. Vigla korespondado kun eksterlando.

Fremdsprachige Länder

Belgien. In Antwerpen arbeitet die Jugend-Abteilung recht lebhaft. 2 Anfängerkurse und einer für Fortgeschrittene. In Brügge Fortbildungskursus.

Brasilien. 12. 1. wurde ein Austausch-Klub in S. Salvador (Bahia) gegründet, der eine „Interŝanĝa Revuo“ herausgeben will.

Großbritannien. Kurse werden abgehalten in Birmingham, Cheltenham (2), Coventry (Radio-Gesellschaft), Dunedin (Schulkinder) und Palmerston (30 Schüler) auf Neuseeland. Gruppen wurden gegründet in Farnley Tyas (Huddersfield), London (Finsbury Park und Sydenham).

Italien. Die Radio-Vereinigungen von Pisa und Turin begünstigen Esperanto. Erstere nahm es in seine Statuten als internationales Verkehrsmittel auf. — Kurse in Turin (Eisenbahner, Kaufleute) und Triest (20 Teilnehmer).

Japan. Lebhaftige Arbeit der Esperantisten dauert ununterbrochen an. Tokio: Kursus mit 40 Teiln. im fremdsprachlichen, 250 im medizinischen Kollegium, 70 in der höheren Schule. Yokohama: Kursus mit 90 Teiln. im technischen Kollegium. Weitere Kurse in Nakano, Nagoja, Fushimi, Fukuoka (80 Studenten), Tokushima (2 im E-Institut, 1 in der Normalschule mit 70 Teil.), Dairen, Maizuru, Tojama. Neue Gruppen entstanden in Sendai, Kuroishi, Nagoja, Tokio, Kacigau, Hiujasa, Takanabe (Lyzeum), Gifu (Handelsschule).

Litauen. In Kediainiai wurde im Seminar eine E-Gruppe gegründet (30 Mitgl.). Kursus in Mariampole. In Panevezys wurde zum Besten der Blinden ein Blumentag veranstaltet. Dadurch wurde ein neuer Kursus ermöglicht. Die litauischen Lehrer-Esperantisten wollen sich gern einer internationalen Organisation anschließen.

Niederlande. In Maastricht wurde E in die Kaufmännische Abendschule eingeführt; 150 Schüler. Der Vorstand des Niederländischen Lehrervereins wurde beauftragt zu untersuchen, ob es wünschenswert sei, daß sich der Verein mit der Welthilfssprache E beschäftige. In 200 Abteilungen wird dieses Problem durchberaten und im folgenden Jahre darüber Beschluß gefaßt.

Südslavien. Agram (Zagreb): 40 Anfänger besuchen einen Fortbildungskursus. Die Abende leitet jedesmal ein anderer E-ist. Kursus für 25 Arbeiter. Subotica: Kursus beendet mit 15 Teiln. Belgrad: Neuer Kursus mit 60 Teiln. Weitere Kurse in Gjurĝjevac, Ljubljana, Sanski Most (Fachschule), Sarajewo, Podgora, Sinj, Komiza. A. Naumann

Esperanto en la praktiko

Esperanto kaj Medicino

La fame konata firmo *Burroughs Wellcome & Co.* en London E. C. 1, Snow Hill Buldings, kiu jam antaŭ la milito eldonis E-katalogojn, denove eldonis du broŝuretojn pri siaj fabrikaĵoj (hemikaĵoj). Unu el ili: „Konataj medicinaj produktoj“, estas destinita nur por la kuracista profesio, la alia: „Preparaĵoj de tutmonda intereso“ estas legaĵo por Esperantistoj ĝenerale. La dua libreto estos sendata al ĉiu E-isto, kiu petos ĝin de la firmo, la unua nur al kuracistoj interesigantaj pri ĝi. Do oni postulu ilin laŭ tio!

Esperanto-Bleistift

Zum Wiener Kongreß hat es die bekannte Bleistiftfabrik Johann Faber, Nürnberg, unternommen, einen Esperanto-Bleistift dortselbst erstmals anbieten zu lassen.

Die Ausführung desselben ist wohl gelungen; auf dem grünen Stift ist auf der einen Seite der Name Esperanto, beiderseitig mit dem fünfzackigen Stern versehen, in Silberdruck eingepreßt, auf der anderen Seite befindet sich der Fabrikname mit der Schutzmarke. Am oberen Ende ist derselbe mit einer Kapsel versehen, deren Breitfläche ein wohl gelungenes Bildnis von Dr. Zamenhof trägt.

Es ist zu wünschen, daß die Esperantistenschaft von dieser Neuerscheinung ausgiebigen Gebrauch macht und in den verschiedenen Schreibwarenhandlungen die Esperantobleistifte verlangt.

Esperanto-Radio in Hamburg

Am 15. Oktober beginnt der Sender Hamburg mit Aussendung von Nachrichten in Esperanto und wird „Dek minutoj da Esperanto“ jeden Montag nachmittags 6 Uhr mit Welle 392 bringen. Man schreibe an „Norag“, Hamburg, Artushof, Gr. Bleichen, über Empfang und über die Zweckmäßigkeit solcher Sendungen für Ausländer.

Radio en Danzig

Jam du fojojn la Esperantistoj en Danzig havis okazon aŭskulti radio-koncertojn kaj -paroladojn. Laŭ iniciato de la prezidanto s-ro *Aeltermann* oni arangis du vesperojn en la ejoj de la „Büro-Maschinen-Bedarfshaus“, Danzig, Stadtgraben 6, kies direktanto, s-ro *Christiansen*, afable disponigis al ni siajn aparatojn (Vox). Ni deziris aŭdi E.-lecionojn de Frankfurt a. M., sed la vetero ne ebligis aŭskultitan stacion. Ni devis kontentiĝi pri koncertoj de Königsberg kaj Berlin-Charlottenburg.

La 9an de Julio la vetero estis pli favora, kaj ni aŭskultis duonhoran paroladon de Dro Nitz el Königsberg pri „Radio kaj Esperanto“ en germana lingvo. La voĉo de nia samideano Nitz sonis el la funelo tiel klare, ke ni komprenis ĉiun silabon. F-ino Mar-o tre lerte stenografis preskaŭ la tutan paroladon, por poste sendi ĝin al la sendstacio en Königsberg.

La Esperantistoj en Danzig havos ankoraŭ ofte okazon, pere de la firmao Büro-Maschinen-Bedarfshaus, aŭskulti radio-paroladojn. Ni esperas, en la vintro aŭskulti London-on, Paris-on aŭ Genève-n. Jam nun la samideanoj avidas aŭdi eksterlandajn amikojn en Esperanto pere de radio. *Aeltermann*

Internacia Radio-Asocio

EL LA TRIA BULTENO / 20. 8. 1924

Ni raportis, ke la American Radio Reley League emis subteni Esperanton por radio-celoj. Ĵus ni eksciis, ke tiu ĉi Ligo en la ĉiujara kunveno de siaj direktoroj fine de Julio decidis, oficiale rekomendi Esperanton kiel la internacian lingvon, adoptotan de la *Internacia Amatora Radio-Unio*.

Internacia Amatora Radio-Unio. La provizora Komitato de tiu ĉi Unio, kiu konsistas el naciaj radio-societoj en diversaj landoj, decidis aranĝi sian unuan Internacian Konferencon en Paris dum Pasko 1925; unu el la gravaj temoj diskutotaj estos tiu pri internacia lingvo.

Estas proponite, ke I. R. A. havu samtempe en Paris sian unuan konferencon, por montri al la aliaj, ke Esperanto estas plene taŭga kiel internacia lingvo por radio. Por sukcesigi nian Konferencon, sufiĉe granda nombro da samideanoj devus veni. Mi petas, ke ĉiu persono, kiu kredas, ke li povos veni Paris-on, informu min kiel eble plej baldaŭ pri tio, por ke mi sciu, kiajn aranĝojn mi devas fari.

Grava punkto estas, ke kvankam plej certe la gravaj Societoj, kiel la Brita, Usona, Franca, Germana, kaj tiel plu, mem sendos siajn proprajn delegitojn, eble la Societoj en la landoj, kie la radio-movado ankoraŭ ne tiom progresis, ne povos sendi oficialan reprezentanton, kvankam ili tre ĝojus, se oni povus reprezenti ilin ĉe la Konferenco. Se Esperantisto interesata pri radio povos veni Paris-on, li plej certe povos veni kiel oficiala reprezentanto de sia nacia Societo.

Harry A. Epton, Sekretario
London, E. 5, 17 Chatsworth Road

Esperanto und Rundfunk

Vortrag von Studienrat Dr. Nitz, gehalten am 9. Juli am Rundfunksender in Königsberg i. Pr.
(Inhaltsangabe)

Die meisten Rundfunkfreunde haben den Wunsch, die Wellen aller Sendestationen der Welt direkt mittels einfachen Detektor-Empfängers auffangen und abhören zu können. In dieser Form ist der Wunsch nicht erfüllbar. Auf dem indirekten Wege der Relaischaltung, bei der aus weiter Ferne kommende Wellen durch eine Sendestation aufgefangen und verstärkt weitergegeben werden, ist es aber z. B. jetzt schon den englischen Sendestationen möglich, auch dem Besitzer eines einfachen Empfangsapparates die Vorträge amerikanischer Stationen zugänglich zu machen. Wir werden es also bald erleben, daß ein Vortrag auf der ganzen Welt gehört werden kann. Wird er aber auch auf der ganzen Welt verstanden werden? Zum Verstehen gehört außer dem Hören der Töne auch das Erfassen ihrer Bedeutung, d. h. die Kenntnis der Sprache. In welcher Sprache wird also der Vortrag zu halten sein, um überall verstanden zu werden?

Das Lateinische wird bei den Hauptkulturvölkern verschieden ausgesprochen, ihm fehlen auch die Ausdrücke des modernen Lebens, zudem ist es schwer erlernbar. Die Bevorzugung einer Nationalsprache würden sich die anderen Völker nicht gefallen lassen. Es bleibt also nur die Annahme einer neutralen Hilfssprache. Eine solche besitzen wir glücklicherweise im Esperanto, das sich seit mehreren Jahrzehnten auf allen Gebieten glänzend bewährt hat und dauernd in raschem Wachstum begriffen ist. Seine Probe bestand das Esperanto im Jahre 1905 auf dem ersten Esperanto-Weltkongreß in Boulogne-sur-mer, wo über 700 Personen aus etwa 30 Ländern sich eine Woche lang mühelos in Esperanto verständigten. Die seitdem jährlich stattfindenden Esperanto-Weltkongresse geben jedem die Möglichkeit, sich persönlich davon zu überzeugen. Aus eigener Erfahrung kann ich bestätigen, daß die Teilnahme an einem solchen Kongreß, das Verstehen über die Sprachgrenzen hinweg, einen ähnlichen Eindruck auslöst wie der erste Radioempfang aus weiter Ferne, das Verstehen über die Raumgrenzen hinweg.

Die Verwendung des Esperanto ist nun auf zwei Arten möglich: Entweder wird die Rede in Esperanto selbst gehalten oder in der Esperantoübersetzung wiederholt. Ein großzügiger Versuch letzterer Art wurde im April d. J. gemacht, indem die Rede des Königs bei der Eröffnung der Britischen Reichsausstellung zunächst in Englisch gehalten und dann in der Esperantoübersetzung wiederholt wurde. Es ist bemerkenswert, daß gerade England in der Esperantobewegung eine führende Rolle spielt, denn der praktisch denkende englische Geschäftsmann durchschaut die Vorteile, die durch Verwendung einer leicht erlernbaren Hilfssprache für den gesamten Auslandverkehr entstehen würden. Er weiß, daß für den Rundfunkverkehr über die Landesgrenzen hinaus das Englische wenig geeignet ist, weil die hier am deutlichsten hörbaren Laute, die Vokale, im Englischen vielfach dunkel, getrübt und für den Ausländer schwer unterscheidbar sind. Esperanto hat keine dunkeln und getrübt Vokale, und es ist deshalb nicht verwunderlich, daß im Rundfunk kürzlich ein Entfernungsrekord New York—Tokio gerade mit einer Esperantorede erzielt wurde.

Die Zahl der von Rundfunkstationen gehaltenen Esperantovorträge belief sich bereits im April d. J. auf 41. Die größte Zahl, nämlich 9, fällt wieder auf England. Je sechs Vorträge gaben die Schweiz, die Tschechoslowakei, Rußland und die Vereinigten Staaten, fünf wurden von Kanada und drei von Frankreich ausgesandt. Inzwischen sind andere Länder hinzugekommen. Die deutschen Stationen Hamburg, Leipzig, Breslau, Frankfurt a. M. gaben Vorträge über Esperanto. Breslau schloß daran einen Lehrkursus für die Esperantosprache, Frankfurt a. M. sogar zwei Kurse nebeneinander. Die Tschechoslowakei nutzt den Umstand, daß Esperantoreden schon jetzt in vielen Ländern verstanden werden, zur Propaganda für Touristik und Messe aus. Diese Möglichkeit der internationalen Reklame sollte sich Deutschland nicht entgehen lassen.

Auf einer Rundfunk-Konferenz in Genf im April d. J. waren 39 Gesellschaften und Stationen vertreten. Nachdem über die Ergebnisse der bisherigen Esperantovorträge berichtet worden war, hat diese Kon-

ferenz eine EntschlieÙung gefaÙt, in der alle Sendestationen ersucht werden, wenigstens an einem Abend jeder Woche Esperanto zu bringen, soweit möglich auch einen Kursus der Esperantosprache zu geben. Bei allen diesen Maßnahmen handelt es sich um ein rein technisches Problem. Nachdem die Radiotechnik es ermöglicht hat, eine Rundfunkrede auf der ganzen Welt zu hören, hat die Sprachtechnik es zu ermöglichen, daß sie auch auf der ganzen Welt verstanden wird. Daß dies mit Esperanto möglich ist, hat die in Tokio verstandene Esperantorede aus New York gezeigt.

Es wird daher manchem schon jetzt lohnend erscheinen, sich durch Erlernung des Esperanto auf die nicht mehr ferne Zeit vorzubereiten, in der auch die deutschen Sendestationen Vorträge der entferntesten Länder nach dem Relais-System weitergeben, wie jetzt schon die englischen Stationen.

Esperanto oder Ido im Rundfunk?

Die Weltsprachenfrage nimmt, ihrer Bedeutung entsprechend, in der Tages- und Fachpresse bereits einen ziemlich breiten Raum ein. Verwirrend, wenn nicht gar abschreckend, muß es auf Fernstehende aber wirken, wenn bald über Esperanto, bald über Ido wie über zwei gleichwertige Konkurrenz-Systeme berichtet wird. Die folgenden Zeilen mögen deshalb zur Klärung beitragen.

Die Ido-Anhänger haben unlängst als großen Erfolg berichtet, daß die führende amerikanische Radio-Zeitung *Radio-News* (Auflage über 300 000) für Ido eintrete. Die Zeitung hat zwar einige Aufsätze auch über Ido veröffentlicht, erklärt aber in ihrer August-Nummer, daß sie sich endgültig für Esperanto entschieden habe. Dasselbe ist der Fall bei der amerikanischen Radio-Gesellschaft *American Relay-League* (mehr als 15 000 Mitglieder).

Die Entscheidung der amerikanischen Gesellschaft wird nicht ohne Einfluß auf die europäischen Radiovereine und -stationen bleiben, von welchen letzteren eine Anzahl sich bereits für Esperanto entschieden hat. Im übrigen wird aber wohl über die allgemeine Einführung des Esperanto nur im vielsprachigen Europa entschieden werden müssen und nicht im einsprachigen Nordamerika, wo man die Notwendigkeit einer Weltverkehrssprache nicht so empfindet wie in Europa und im Orient.

Auf der Konferenz der Radio-Fachleute (Genf 1924) wurde als wichtiger Punkt der Tagesordnung die Weltsprachenfrage behandelt. Es wurde aber nicht über Ido, sondern über (und zu 50% bereits in!) Esperanto gesprochen.

Esperanto läßt sich — trotz aller Einwände der Idisten — genau so leicht telegraphieren wie die Nationalsprachen, die zum Teil viel mehr Buchstaben mit Überzeichen usw. besitzen.

Das Ido wird von seinen Anhängern gern als „verbessertes“ oder „wissenschaftlich vervollkommenes“ Esperanto bezeichnet. Wie wenig das tatsächlich der Fall ist, dürfte auch durch folgende Zahlen erwiesen werden:

Die Zeitschrift „Der Deutsche Rundfunk“ hat kürzlich eine Rundfrage veranstaltet: „Was wollen Sie vom deutschen Rundfunk hören?“ Insgesamt sind 76 000 Wünsche vorgebracht worden. Von den Ein-

sendern haben 30% um Kurse usw. in Esperanto gebeten, dagegen ist Ido nicht verlangt worden. Rundfunk-Esperanto-Kurse werden bereits seit Monaten von den Sendestationen Breslau und Frankfurt (Main), von Mitte September ab auch von Leipzig gegeben. Vorträge haben gebracht: Hamburg, Königsberg, Stuttgart, München. Über Ido ist bisher nur ein einziger Vortrag gehalten worden.

Der diesjährige Ido-Weltkongreß hat nur 200 Teilnehmer zu verzeichnen gehabt, während beim diesjährigen internationalen Esperanto-Kongreß in Wien die Zahl annähernd 4000 betrug. Vertreten waren 38 Länder, darunter von außereuropäischen: Vereinigte Staaten, Kanada, Mexiko, Venezuela, Ägypten, Algier, Kapland, China, Japan, Australien.

Die Antwort auf die Frage der Überschrift kann mithin nur lauten: Ohne Esperanto, die internationale Hilfssprache, kein internationaler Rundfunk!

Brüning

Esperanto und der Völkerbund

Der 2. Ausschuß (technische Organisationen) des Völkerbundes hat am 20. 9. 1924 eine EntschlieÙung angenommen, die sich für eine mit anderen Sprachen gleichberechtigte Verwendung des Esperanto in Telegraphie, Telephonie und Funktelephonie als *offene* Sprache ausspricht. Die Vollkonferenz hat der EntschlieÙung zugestimmt. — Näheres folgt.

Ligoj * Verbände

Esperanto-Vereinigung Deutscher Lehrer

(Asocio de germanaj instruistoj Esperantistaj)

Während des XII. Deutschen Esperanto-Kongresses in Plauen i. V. hielt am 2. Pfingsttage die Vereinigung ihre Hauptversammlung ab, zu der von 600 Mitgliedern 56 aus allen Teilen Deutschlands — besonders aus Sachsen — erschienen waren und die der Direktor des Esperanto-Instituts für das Deutsche Reich, Prof. Dr. Dietterle, durch seine Anwesenheit auszeichnete.

Nach Darbietung des hochinteressanten Jahresberichtes, der besonders die Bemühungen um ein Fachwörterbuch und die internationale Esperanto-Lehrerhilfe für deutsche Kinder hervorhob, dazu des wegen der Inflation gar nicht in Ziffern aufgestellten Kassenberichtes, und nach Entlastungserteilung für den Vorstand, kamen noch 4 wichtige Punkte zur Verhandlung und Beschlußfassung.

1. Angenommen wurde der Antrag der Sachsen auf *Pflichtbezug* der pädagogischen Esperanto-Zeitung „*Novaj Tempoj*“, die nach wiederholten Erklärungen ihrer Leiter ein politisch neutrales, unabhängiges Organ für entschiedenen Schulfortschritt ist.

2. Nach Ablehnung des korporativen Beitritts zur „*Edukista Internacio*“, Paris, an dessen Stelle eine Aufklärung aller linksgerichteten Kollegen zum Zwecke des Einzelanschlusses treten soll, wurde beschlossen, die Gründung einer internationalen Organisation der

Esperanto-Lehrer aller Länder, die in Nürnberg 1923 in die Wege geleitet wurde, auf dem diesjährigen XVI. Esperanto-Weltkongresse in Wien zu Ende zu führen. Deren Organ soll die obengenannte Zeitung „Novaj Tempoj“ sein.

3. Der Antrag — Berlin —, auf Erweiterung der Lehrerprüfungsordnung des Esperanto-Instituts für das Deutsche Reich hinzuwirken, wurde aus praktischen Gründen abgelehnt und der Antragsteller an das Preußische Ministerium für Volksbildung verwiesen.

4. Für jede der größeren, fortschrittlichen deutschen Lehrerzeitungen soll ein Vertrauensmann bestellt werden, der aus seiner Zeitung internationale wichtige Nachrichten in Esperanto-Übersetzung an die Zentralstelle: Koll. M. Goldberg, Leipzig-Connewitz, Klemmstr. 14, pt., weiterleitet und umgekehrt wichtige Nachrichten aus Esperanto-Zeitschriften — besonders aus „Novaj Tempoj“ — deutschsprachig in seiner Zeitung unterbringt. Freiwillige Meldung solcher Vertrauensmänner und der Anschriften ihrer Zeitungen nimmt der Vorstand gern entgegen.

